

Ĉe La Hancock-Monto

Estis je la sekvinta posttagmezo, kiam ni sur vaporantaj ĉevaloj atingis la randon de la valo, en kiu la Helldorf-*settlement* estis troviĝinta. Jam la unua alvido eksciigis nin, ke Monk ne estis mensoginta, kaj ke ni venis tro tarde. La lignodomoj ne plu estis pli ol fumantaj ruinaĵoj.

„Uf!“ Winnetou vokis kaj montris al la altaĵo. „La filo de la bona Manitou foras. Winnetou disŝiros tiujn ogelalajn lupojn!“

Verece, ankaŭ la kapeleto estis detruita kaj forbrulita, kaj oni estis faliginta la krucon de la altaĵo. Ni rapide rajdis al la ruinaĵoj kaj salte deĉevaliĝis. Mi retenis la *railroader*:ojn de tie ĉi, pro ke neniuj spuroj estis forviŝata. Malgraŭ ĉia serĉado neniuj spuroj de ankoraŭ vivanta kreaĵo estis troveblaj. Nun mi alvokis la homojn. Ili devis helpi al mi serĉe disigi la fumantan rubaĵon. Ni trovis neniujn homajn restaĵojn, kaj tio estis bona konsolo.

Winnetou estis, tuj kiam li estis deĉevaliĝinta, grimpinta supren sur la kapelan monton kaj nun revenis. Li portis la sonorileton en la brakoj.

„La apaĉo trovis la voĉon de la alteco“, li diris. „Li enterigos ĝin tie ĉi, ĝis li revenos kiel venkinto.“

Intertempe mi esploris la bordojn de la lago per ĉia hasto, pro ekscii, ĉu oni eble dronigis la *settler*:ojn, sed mi kredis, ke tio ne estis okazinta. Pli detala ekzameno rezultigis, ke la loĝejo estis atakita meze en la nokto. Batalo laŭŝajne tute ne estis okazinta. Poste la venkintoj estis foririntaj kune kun iliaj rabaĵoj kaj la kaptitoj en la direkton al la limo de Idaho kaj Wyoming.

„Aŭskultu, vi viroj, ni nun ne perdu unu momenton!“ mi vokis. „Ni ne nun povas restadi, sed ni postrajdu laŭ la spuro kiel longe ni povas vidi ĝin, kaj nur poste, kiam vesperos, ni ekrestos. Ek, antaŭen!“

Kun tiuj vortoj mi reiĝis sur la nigran virĉevalon. La aliaj sekvis. La apaĉo rajdis je la pinto kaj neniam deigis sian vidon de la spuroj de la malamikoj. Oni estus devinta mortigi lin pro deigi lin de tiu spuro, tia kolero estis ekreginta lin. Kaj simile ni ĉiuj fartis. Ni

estis kvardek kontraŭ okdek viroj, sed en tiu animstato oni ne nombras la kontraŭulojn.

Ni ne plu havis tri plenajn horojn da taglumon, kaj dum tio ni pasigis tiel longan distancon, ke ni povis ege kontenti pri la eminentaj klopodoj de niaj ĉevaloj. Tiam ni donacis al ili la bonmeritan ripozon.

Je la sekvinta tago klariĝis, ke la ogelaloj estis tri kvaronoj de tagrajdado antaŭ ni, kaj pli poste ni rimarkis, ke ili estis daŭrigintaj ilian rajdadon dum la tuta nokto. La kaŭzo de tiu hasto diveneblis. Winnetou estis elvokinta sian nomon dum la atako en la malhelan nokton. Ili sciis, ke oni sekvis ilin, ili sciis, ke la apaĉo estis malantaŭ ili, kaj tio estis sufiĉa kaŭzo hasti.

Ĉar niaj ĉevaloj ĝis nun estis efikintaj preskaŭ neeblaĵon, ni ne devis klopodigi ilin plu. Estis tre grave, ke iliaj fortoj estis tenataj. Tial okazis, ke ni ne pli proksimiĝis al la malamikoj je tiu tago.

„La tempo pasas“, Akrokulo grumbliis, „kaj ni venos tro tarde.“

„Ni ne venos tro tarde“, mi respondis. „La kaptitoj estas dediĉataj por la torturo-fosto, kaj ilia sorto nur tiam finiĝos, kiam la ogelaloj estis atingintaj iliajn vilaĝojn.“

„Kie la vilaĝoj nun troviĝas?“

„La vilaĝoj de la ogelaloj nun estas supre ĉe la Yellowstone“, Winnetou deklaris, „kaj ni atingos tiujn rabistojn jam multe pli frue.“

Je la sekvinta tago ni ektrovis eminentan malhelpaĵon: la spuro disiĝis. Unu duono plukondukis al la nordo, la alia deflankiĝis okcidenten. La norda estis la pli granda.

„Ili volas erarigi nin!“ Akrokulo diris.

„La blankaj viroj atendu!“ Winnetou ordonis. „La spuro ne estu tuŝata de unu piedo.“ Post tio li donis mansignon al mi, kiun mi tuj komprenis. Mi rajdu laŭ la rekte pluiranta, kaj li volis rajdi laŭ la dekstren flankiĝinta spuro. Ni do plurajdis, ĉiu al sia direkto. La aliaj devis resti tie.

Mi rajdis ĉirkaŭ kvaronan horon. La nombro de la ĉevaloj, kiuj estis tie trotintaj, estis malfacile ekkoneble, ĉar la unuopaj bestoj estis rajdintaj unu post la alia. Sed per la profundeco kaj la formo de la kunaj hufpremaĵoj mi povis konkludi, ke ne estis multe pli ol dudek. Dum tiu ekzamenado mi rimarkis en la sablo kelkajn malgrandajn, rondajn makulojn, je ambaŭ flankoj de ili strangan amasiĝaĵon de la malsekaj sableroj, kaj antaŭ tio la loko aspektis tiel, kvazaŭ vasta aĵo estis frotinta jen kaj reen sur la loko. Tuj mi galope reeniris kaj trovis Winnetou:n jam atendante.

„Kion mia frato vidis?“ mi demandis lin.

„Nenion, nur la spuron de rajdintoj.“

„Antaŭen!“

Kun tiuj vortoj mi returnigis mian ĉevalon kaj forhastis.

„Uf!“ la apaĉo vokis.

Li miris pri mia certeco, kaj eksciis per ĝi, ke mi certe estis trovinta netrompigan pruvon, ke la kaptitoj estis forkondukataj al tiu direkto. Kiam mi atingis la lokon, kiuj evidentiĝis al mi antaŭe, mi haltis kaj demandis Moody:n:

„Stephen, Vi estas deca okzidentulo kaj estis sufiĉe fiere pri tio kiam ni interkonatiĝis. Vidu al tiu spuro, kaj diru al mi, kion ĝi signifas!“

„Ĉu spuro?“ li demandis. „Kie?“

„Tie ĉi! Winnetou certe havos la saman opinion kiel mi pri tiuj preskaŭ nevideblaj signoj. Mia ruĝa frato rigardu ilin!“

La apaĉo deĉevaliĝis, kliniĝis, kaj faris longan, ekzaminantan vidon al la loko.

„Mia frato Ŝarlih elektis la ĝustan vojon“ Winnetou deklaris. „Tie ĉi rajdis la kaptitoj. Tiuj makuloj estas sango. Dekstre kaj maldekstre de tio estis la manoj, kaj tie antaŭe la korpo de infano —“

„— kiu“, mi pluis, „glitis de la ĉevalo kaj falis kun la vizaĝo antaŭen sur la teron, tiel ke la nazo eksangis!“

„Ha!“ Stephen vokis. „Tio vere estas —“

„Ho, tio ne malfacile videblas! Sed mi supozas, ke venos io alia, kio kaŭzos multe pli da penoj al ni. Antaŭen!“

Mi pravis. Post apenaŭ dek minutoj ni atingis rokan ejon, kaj ekde tie ĉiuj spuroj ekfinaĝis.

La aliaj devis halti pro ne plimalfaciligi la serĉadon, kaj ne daŭris longe, ĝis la apaĉo elpuŝis ĝojan vokon, kaj portis al mi dikan, flave kolorigitan fadenon.

„Kion Vi diras pri tio, Stephen?“

„Tiu fadeno estas de kovrotuko.“

„Prave! Vidu al la akraj finaĵoj. Oni distranĉis kovrilojn kaj volvis iliajn parton ĉirkaŭ la hufoj de la ĉevaloj, proke ili ne lasas spuron. Ni nun ege klopodu.“

Ni pluserĉis, kaj ĝuste! Kelkajn tridek paŝojn pli fore mi rimarkis je herboj, kiuj kreskis tie sur la roka tero, la malbone forviŝitan premaĵon de indiana mokaseno. La pozicio de la piedo indikis al ni la direkton, kien la irado estis pluigita.

En tiu direkto ni baldaŭ trovis pluajn indikojn, kaj fine ni ekkonis, ke la persekutatoj tie ĉi estis antaŭeniĝintaj eminente pli malrapide. Post longa tempo la spuroj reestiĝis pli klare videblaj. Oni liberigis la hufojn de la ĉirkaŭvolvaĵoj, kaj fine ni vidis klare, ke la indianoj estis piedirintaj flanke de la ĉevaloj.

Tio estis strange, kaj pensigis min, ĝis Winnetou subite haltigis sian ĉevalon, vidis en la forecon kaj faris geston, kvazaŭ li estis ekhavinta ideon.

„Uŝ!“ li vokis. „La kaverno de la monto, kiun la blankuloj nomas Hancock!“

„Kio estas pri tio?“

„Winnetou nun scias ĉion. En tiu kaverno la suoj ofertas iliajn kaptitojn al la Granda Spirito. La ogelaloj disiĝis. La pli malgranda parto rajdis dekstren pro alvenigi la apartiĝintajn trupojn de la tribo, kaj la granda parto portis la kaptitojn al la kaverno. Oni ligis plurajn sur unu ĉevalon, kaj la ogelaloj piediris flanke de ĝi.“

„Kiel longe tiu monto estas for de tie ĉi?“

„Miaj fratoj atingos ĝin je la vespero.“

„Neeble! La monto Hancock ja estas je la supra Snake River!“

„Mia blanka frato pripensu, ke estas du montoj Hancock!“

„Ĉu Winnetou konas la ĝustan?“

„Jes.“

„Kaj ankaŭ la kavernon, ĉu?“

„Jes. Winnetou establis aliancon kun la patro de Ko-itse en tiu kaverno, kiun la ogelalo poste perfidis. Miaj fratoj forlasu tiun spuron kun mi kaj lasu ilin gvidi de la apaĉo!“

Winnetou kondukis, kvazaŭ li estis plencerte pri sia supozo, sentigis la spronojn al sia ĉevalo kaj galope forrajdis, ni sekvis lin. Kelkan tempon ni rajdis tra valoj kaj kanjonoj, ĝis subite la montoj disiĝis, kaj antaŭ ni estis ebena herbejo, kiuj ŝajnis esti nur limigita de altaĵoj je la fora horizonto.

„Tio estas I-akom-akono, la ‚Prerio de la Sango‘, en la lingvo de la Tehuoj“, Winnetou deklaris, sen ĉesi sian rapidan rajdon.

Do tiu estis la teruriga sangoprerio, pri kiu mi estis aŭdinta tiom multe! Tien ĉi la unuigintaj triboj de la Dakotoj estis kondukintaj iliajn kaptitojn, tiam liberigintaj kaj pelĉasintaj ilin ĝismorte. Tie ĉi miloj da senkulpaj buĉoferuloj ekmortis sur la fosto, en la fajro, per la tranĉilo, aŭ eĉ estis vivante enterigitaj. Tien ĉi neniu fremda indiano kuraĝis iri, ne parolendas pri blankulo, kaj ni rajdis trans tiu ebenaĵo tiel senzorge, kvazaŭ ni troviĝus sur la plej pacema tereno. Nia gvidanto dum tio vere povis esti nur Winnetou.

Jam la ĉevaloj komencis laciĝi per la rajdegado. Tiam malrapide aperis antaŭ ni solstaranta altaĵo, kiu ŝajnis konsisti el pluraj kunŝoviĝintaj montoj. Ni atingis ĝian arbaran kaj arbedaran bazon, kaj tie lasis la ĉevalojn resti.

„Tiu estas la monto Hancock“, Winnetou interrompis la silentadon.

„Kaj la kaverno, ĉu?“ mi scivolis.

„Ĝi estas je la alia flanko de la monto. Mia frato vidis ĝin post unu horo. Li sekvu min, sed lasu siajn pafilojn tie ĉi!“

„Mi sole, ĉu?“

„Jes. Ni estas tie ĉi je la loko de la morto. Nur firmanima homo ne pereos tie ĉi. Miaj fratoj kaŝiĝu malantaŭ la arboj kaj atendu!“

La monto, je kies bazo ni nun troviĝis, estis vulkaneca formitaĵo kun vasteco de eble tri kvaronaj horoj. Mi demetis la Henry-pafilon kaj la ursmortigilon kaj sekvis Winnetou:n, kiu komencis grimpi supren laŭ la okcidenta flanko de la monto. En mallongaj, serpentumaj linioj li celis al la pinto. Estis peniga vojo, kaj mia gvido pasis ĝin per atentigo, kvazaŭ li devis ekspekti malamikon malantaŭ ĉiu arbedo. Tiel vere daŭris horon, ĝis ni alvenis supre al la pinto.

„Mia frato estu tute silente!“ Winnetou flustris, malsuprenkuŝante kaj malrapide rampante inter du arbedojn.

Mi sekvis lin sensone, kaj — estus preskaŭ reencedinta ektimigite, ĉar apenaŭ ke mi estis ŝovinta mian kapon tra la branĉoj, mi ekvidis ĵus antaŭ mi la funelforman, krutan faŭkon de kratero, kies randon mi povis atingi per la mano. Tiu faŭko havis nur malmultajn arbedojn kaj estis certe kvardek kvin metrojn profunde. Malsupre ĝi havis areon de eble dek du metrojn je diametro, kaj tie kuŝis la de ni serĉitaj loĝantoj de la *Hellendorf-settlement*, katenite je manoj kaj piedoj. Verŝajne ili ĉiuj estis kondukintaj tien ĉi. Ĉe ili troviĝis plurnombra gardistaro de ogelaloj.

Per vidoj mi esploris ĉiun piedvaston de tiu finbruliĝinta kratero, ĉu oni povis iri malsupren de tie ĉi. Jes, eblis, se oni estis aŭdeceme, posedis fortikan ŝnuregon kaj trovis rimedon forigi la gardistojn. Tieis pluraj rokaj elstaraĵoj, kiujn oni povis uzi pro

resti aŭ kiel stabilajn punktojn por la piedoj.

Nun Winnetou reencedis, kaj mi sekvis lin.

„Ĉu tio estas la kaverno de la monto?“ mi demandis.

„Jes.“

„Kie estas la aliro?“

„Je la flanko, kiu estas al la oriento. Sed neniu homo sukcesos iri al ĝi.“

„Do ni grimpos malsupren tie ĉi. Ni havas lazojn, kaj niaj fervojistoj estas sufiĉe provizita kun ĉevalaj ŝnuregoj.“

Li kapjesis, kaj ni intertempe reeniris al niaj kunuloj. Estis nekompreneble al mi, kial la indianoj ne gardis la okcidentan flankon de la monto. Nerimarkita alproksimiĝo tiukaze estus estinta neeble al ni.

Kiam ni realvenis malsupre, la suno ĵus malaperis malantaŭ la horizonto, kaj ni komencis niajn pretiĝojn. Ĉiuj ĉeestantaj ŝnuregoj estis kunkolektitaj kaj alligitaj al unu longa. Winnetou elektis dudek el la tre lertaj viroj. La aliaj devis resti ĉe la ĉevaloj. Sed du el ili devis surĉevaliĝi tri kvaronajn horojn post nia foriro, kaj rajdi arkegon ĉirkaŭ la monto al la oriento, pro bruligi fajrojn en longa distanco, sed tiel, ke la prerio ne komencu bruli. Tiam ili rapide revenu. Per tiuj fajroj la apaĉo volis deflankigi la atenton de la gardistoj de ni kaj al la prerio.

La suno estis malaperinta, kaj la oriento ardis en helaj koloroj, kiuj iom post iom transiĝis al plej malhela purpurumo, tiam resenkoloriĝis kaj estingiĝis en la vespera grizo. Winnetou estis forlasinta la kunan restejon. Dum la lastaj horoj li estis ŝajninta tute alimaniere al mi kiel li estis kutime. La fiksa, certa, vido de lia okulo estis ŝanĝinta al netrankvila flagrumo, kaj sur lia ĉiam glata frunto estis aperinta faldaĵoj, kiuj indikis pri nekutimaj zorgoj aŭ pri pensoj de tia seriozeco, ke ili kapablis ĝeni la nekompareblan ekvilibron de lia interno. Io afliktigis lin, kaj mi kredis ne nur havi la rajton, sed ankaŭ la devon demandi lin pri tio. Tial mi foriris pro serĉi lin.

Winnetou staris je la rando de la arbaro, apogante al arbo, kaj rigardis per fiksa vidado okcidenten al la nubajoj je la ĉielo, kies antaŭe ore borderitaj randoj estis en la lasta stato de paliĝado. Kvankam mi iradis tre mallaŭte, kaj malgraŭ la enpensigemo, en kiu li videble troviĝis, li ne nur aŭdis miajn paŝojn, sed eĉ sciis, kiu proksimiĝis al li. Sen turniĝi li diris:

„Mia frato Ŝarlih venas pro vidi sian amikon. Li agas ĝuste per tio, ĉar baldaŭ li serĉos lin vane.“

Mi metis mian manon sur lian ŝultron.

„Ĉu estas ombroj sur la animo de mia frato Winnetou? Li forpelu ilin.“

Li levis la manon kaj montris okcidenten.

„Tie ĵus antaŭ kelkaj momentoj ankoraŭ flamis la fajro kaj la ardo de la vivo! Nun ĝi finiĝis, kaj la malheleco aperas. Iru tien! Ĉu Vi povas forpeli la ombrojn, kiuj malleviĝas tie?“

„Ne. Sed la lumo revenos je la mateno, kaj nova tago komencos.“

„Por la Hancock-monto morgaŭ komencos nova tago, sed ne por Winnetou. Lia monda suno estingiĝas, same kiel tiu estingiĝis, kaj ĝi neniam releviĝos. La neksta matena ruĝo ne ridos plu al li tie ĉi.“

„Tiuj estas mortantaŭsentoj, al kiuj mia frato ne dediĉiĝu! Certe, la hodiaŭa vespero estos tre danĝera al ni. Sed kiel ofte ni vidis en la okulon de la morto, sed tamen, ajn kiam ĝi etendis la manon al ni, ĝi cedis per nia gaja, fiksa vido. Forpelu la melankolion, kiu regas cin! Ĝia kaŭzo estas nur la korpaj kaj mencaj penoj de la lastaj tagoj.“

„Ne, Winnetou ne lasas sin venki de peno, kaj neniu laciĝo povas forrabi la gajecon de lia animo. Mia frato Ŝarlih konas lin, kaj scias, ke la apaĉo soifis pri la akvo de la ekono, de la scio. Ci donis ĝin al li, kaj li trinkis ĝin per plenaj glutoj. Winnetou lernis tiom multe, tiom, kiom neniu el liaj fratoj, sed tamen li restis ruĝa viro. La blankulo similas al lernema dombesto, kies flarkapablo malakriĝis, sed la indiano al la sovaĝa besto, kiu ne nur tenis siajn akrajn sensojn, sed ankaŭ aŭdas kaj vidas per la animo. La sovaĝa besto scias ekzakte, kiam la morto proksimiĝas. Ĝi ne nur antaŭsentas, sed ĝi sentas ĝian venon per certeco, kaj ĝi kaŝiĝas en la plej densan subkreskaĵon de la arbaro pro pereci trankvile kaj sole. Tiun antaŭsenton, tiun senton, kiu neniam trompas, sensas Winnetou.“

Mi premis lin al mi.

„Sed tamen ĝi trompas cin. Ĉu ci eble estis havinta tiun senton jam antaŭe?“

„Ne.“

„Do hodiaŭ la unuan fojon?“

„Jes.“

„Kiel ci do povas koni ĝin? Kiel ci povas scii, ke estas la antaŭento de la morto?“

„Estas tiel klare, ke ĉia trompiĝo neblas. Ĝi diras al mi, ke Winnetou mortiĝos, kun kuglo en la brusto. Ĉar nur kuglo povas faligi lin. Tranĉilon aŭ *tomahawk*:on la ĉefo de la apaĉoj povos facile defendi de si. Mia frato kredu al mi, lia amiko iras hodiaŭ en la Ĉiamajn Ĉase—“

Li paŭzis. „En la Ĉiamajn Ĉasejojn“ li estis volinta diri, laŭ la kredo de la indianoj. Kion detenis lin fine eldiri tiun vorton? Mi ĝin sciis: Winnetou estis interne estiĝinta kristano per la kontakto al mi, kvankam li estis evitinta eldiri tiun konfeson. Li metis sian brakon ĉirkaŭ mi, kaj ŝanĝis la antaŭe intencitan vorton:

„Mi hodiaŭ iras tien, kien la filo de la bona Manitou iris antaŭ ni, pro pretigi por ni la loĝejojn en la domo de sia patro, kaj kien mia frato Ŝarlih iam sekvos min. Tie ni revidiĝos, kaj ne plu estos diferenco inter la blankaj kaj la ruĝaj infanoj de la patro, kiu akceptas ilin ĉiujn per la sama, senfina amo. Tiam estos ĉiama paco. Ne plu estos murdado, ne sufokado de homoj, kiuj bonis kaj venis renkonte al la blankuloj paceme kaj prifideme, sed pro tio estis ekstermitaj. Tiam Manitou tenos la pesiltelerojn en sia mano, pro pesi la agojn de la blankuloj kaj de la ruĝuloj, kaj la sangon kiu estis senkulpe verŝita. La ĉefo de la apaĉoj sed ĉestaras, kaj petos por la murdistoj de siaj fratoj pri indulgo kaj kompatado.“

Winnetou premis min al si kaj silentis. Mi estis ege kortuŝita, ĉar interna voĉo flustris al mi: „Lia antaŭento neniam trompis lin. Eble ĝi ja ankaŭ ĉifoje diras la veron!“ Tamen mi diris:

„Mia frato pensas sin mem esti pli forta, ol li vere estas. Li estas la plej forta militisto de sia tribo, sed ankaŭ nur viro. Mi neniam vidis lin laciĝi, sed hodiaŭ li laciĝis, ĉar la pasintaj tagoj kaj noktoj postulis multe tro de ni. Tion premas la animon malsupren,

kaj malfortigas la memfidon. Ekestas sinistraj pensoj, kiuj rapide remalaperos, kiam la laceco forcedis. La apaĉo ripozu. Li kuŝiĝu ĉe la la viroj, kiuj restos ĉi supre ĉe la monto.“

Li malrapide skuis la kapon.

„Tion mia frato Ŝarlih ne diris serioze.“

„Sed jes! Mi ja vidis la internon de la kaverno de la monto, kaj mezuris ĝin ekzakte per la okulo. Sufiĉos, ke mi sole estos la atakontojn.“

„Winnetou ne ĉeestu, ĉu?“ li demandis, dum liaj okuloj plibriliĝis.

„Ci faris sufiĉe, ci ripozu.“

„Ĉu ci ne ankaŭ faris sufiĉe, jes eĉ pli ol Winnetou kaj ĉiuj aliaj? La apaĉo ne restos reel!“

„Ĉu ankaŭ ne, kiam mi petas cin pri tio, kiam mi postulas ĝin de ci kiel ofero de amikeco?“

„Ankaŭ tiam ne! Ĉu oni diru, ke Winnetou, la ĉefo de la apaĉoj estis timinta la morton?“

„Neniu homo riskos aserti tion!“

„Eĉ se ĉiu silentos kaj ne estimos ĝin esti malkuraĝo de mi, estos unu, kies riproĉo aperigos la ruĝecon de la honto sur mian vizaĝon.“

„Kio estus tiu?“

„Winnetou mem! Mi mem ĉiam kaj ĉiam plu krius en la orelojn de tiu Winnetou, kiu restis, kiam sia frato Ŝarlih batalis sen timiĝi antaŭ la morto, ke li aparteniĝis al la malkuraĝuloj kaj ne plu dignas nomi sin militisto, ĉefo de sia brava popolo. Ne, ne, ne parolu pri tio, ke mi restu ree. Ĉu mia frato Ŝarlih silentante, kiam li ankaŭ neniam farus ĝin laŭte, alkalkulu min al la senkuraĝaj kojotoj? Ĉu Winnetou malestimu sin mem? Ne! Pli bone la morton, dekoble, centoble kaj miloble!“

Tiu lasta kaŭzo fakte silentigis min. Winnetou fakte estus interne kaj ekstere pereonta per la memriproĉo esti aginta malkuraĝe. Post mallonga paŭzo li pluis:

„Ni staris tiel ofte antaŭ la morto, kaj mia frato ĉiam estis pretiĝinta por ĝi kaj skribis por Winnetou en sian notlibron, kio okazu, se li falos dum la batalo. La apaĉo tiam prenu la libron, legu la notojn kaj agu laŭ ili. Tio estas nomata testamento de la palvizaĝoj. Winnetou ankaŭ faris testamenton, sed ne jam parolis pri ĝi. Hodiaŭ, kiam li sentas la proksimon de la morto, li parolu pri ĝi. Ĉu ci volas esti la efikiganto?“

„Jes. Mi scias kaj deziras, ke cia antaŭsento ne plenumiĝos, ke ci migras ankoraŭ multajn, multajn somerojn sur la tero, sed kiam ci iam ekmortos, kaj mi scias cian lastan volon, estos la plej sankta el miaj devoj efikigi ĝin.“

„Eĉ, se estus malfacila kaj ligata al egaj bataloj, danĝeroj kaj malhelpaĵoj, ĉu?“

„Tion Winnetou ja ne demandas serioze. Sendu min en la morton, kaj mi iros!“

„Winnetou scias tion, Ŝarlih. Pro li ci saltos en la malferman faŭkon de la morto. Ci faros, kion mi petas de ci. Ci sole estas tiu, kiu kapablas fari tion. Ĉu ci memoras, ke ni iam, kiam cia frato ne jam konis cin kiel nun, interparolis pri la riĉeco?“

„Jes, tre detale.“

„La apaĉo tiutempe aŭdis per la sonoj de ciaz vortoj, ke ci eble ja vere pensas alimaniere kiel ci parolis. La oro havis grandan valoron al ci. Ĉu estis tiel?“

„Ci almenaŭ ne tute eraris“, mi konfesis.

„Kaj nun, ĉu? Ci diru la veron al cia frato!“

„Ĉiu blankulo konas la valoron de la posedaĵo, sed mi ne celas al egaj trezoraĵoj kaj mondaj ĝuaĵoj. La vera feliĉo bazas nur sur la trezoroj, kiujn oni kolektas en la koro.“

„Winnetou sciis, ke ci hodiaŭ parolus tiel. Ne estas sekreto al ci, ke la apaĉo konas multajn lokojn, kie troveblas oro en ercovejnoj kaj kiel *nugget*:oj kaj polvo. Li povas diri al ci nur unu el tiuj lokoj, kaj ci estus tre riĉa viro, sed ne plu gaja. La bona, saĝa Manitou ne kreis cin pro malhardigite ĝuadi riĉecaĵojn, cia forta korpo kaj cia animo estis destinitaj por io pli bona. Ci estas viro kaj restu viro. Tial mi ĉiam estis decidinta ne malkaŝi al ci unu el la trovejoj de la oro. Ĉu ci ĉagrenos pri mi pro tio?“

„Ne“, mi respondis, en tiu momento fakte laŭ la vero. Mi staris antaŭ la plej bona amiko, kiun mi iam havis. Li vidis la morton antaŭ si, kaj konfidis sian lastan volon al mi. Kiel povis ekidei al mi eksenti malnoblan avidon pri oro!

„Sed tamen ci vidis oron, eĉ multan oron“, li pluparolis. Sed ne estas por ci. Kiam mi estis mortiginta, iru al la tombo de mia patro. Ci ja konas ĝin. Kiam ci fosas en la tero je lia piedo, ekzakte sur la okcidenta flanko, ci trovos la testamenton de cia Winnetou, kiu tiam ne plu estos ĉe ci. Tie miaj deziroj estas notitaj, kaj ci plenumigos ilin.“

„Mia aserto estas kiel ĵuro“, mi certigis al li kun larmoj en la okuloj. „Neniu danĝero, ajn ege danĝera, povos reteni min plenumigi, kion ci skribis.“

„Mi dankas al ci. Kaj nun ni finiĝas. La tempo de la atako alvenis. Winnetou ne travivos la batalon. Ni adiaŭu, mia kara, kara Ŝarlih! La bona Manitou rekompencu al ci, ke ci estis tiom multo al cia frato! La koro de Winnetou sentas pli ol li povas diri per vortoj. Ne lasu nin plori, nin, kiuj estas viroj! Enterigu min en la Grand-Ventre-montoj, ĉe la bordo de la Metsur Creek, sur mia ĉevalo kaj kun ĉiuj miaj armiloj, ankaŭ kun mia arĝentopafilo, kiu ne venu en iajn aliajn manojn. Kaj kiam ci poste estos reveninta al la homoj, el kiuj neniu amos cin, kiel mi amas cin, tiam intertempe pensu pri cia amiko kaj frato Winnetou, kiu nun benas cin, ĉar ci estis beno al li!“

Li, la indiano, metis siajn manojn sur mian kapon. Mi aŭdis, ke li nur pene povis eviti plorĝemon, kaj ŝiris lin al mi per ambaŭ brakoj, plorante elpuŝante:

„Winnetou, mia Winnetou, estas ja nur antaŭsento, ombro, kiu pasos. Ci restu ĉe mi, ci ne foriru!“

„Winnetou foriros!“ li respondis mallaŭte, sed decidite, deĝis de mi per sinvenkado kaj returniĝis al la restejo.

Sekvante lin, mi serĉadis vane rimedon en mia cerbo igi lin ne partopreni en la okazonta batalo. Mi ne trovis iun, ĉar ne estis iu. Kion mi estus fordoninta, kaj kion mi ankoraŭ hodiaŭ fordonus, se estus estinta eble al mi trovi solvon!

Mi estis ege ekscitigita, kaj ankaŭ Winnetou, kvankam la rego, kiun li havis pri si mem, ankoraŭ ne estis venkinta sian kortuŝaton, ĉar mi aŭdis, ke lia voĉo mallaŭte vibris, kiam li postulis al la homoj:

„Nun estas tute malhele, kaj ni ekiru. Miaj fratoj sekvu Old Shatterhand:on kaj la apaĉon!“

Unu post la alia, ni grimpis supren laŭ la monto, sur la vojo, kiun Winnetou estis antaŭe irinta kun mi. La mallaŭta grimrado nun en la malheleco estis multe pli mal-facile ol dum la tago, kaj ni bezonis pli ol horo, ĝis ni atingis la randon de la kratero. Malsupre brulis grandega fajro, kaj per ĝia brilo ni vidis la kaptitojn kaj iliajn gardistojn kuŝi. Neniu vorto, neniu sono iĝis supren al ni.

Unue ni fiksitis la ŝnuregon al rokŝtono, kiu sufiĉe longis pro atingi la bazon. Tiam ni atendis la ekaperon de la fajroj sur la prerio. Ne daŭris longe, tiam videblis en la oriento unu post la alia tri, kvar, kvin flamoj, kiuj tute similis al fajroj de restejo. Nun ni vidis kaj aŭdis scivolege en la krateron. Ni ne taksis malbone, ĉar jam post mallonga tempo ni vidis ruĝulon aperi el rokfendo, kiu diris kelkajn vortojn al la aliaj. La gardistoj tuj stariĝis kaj malaperis kun li tra la fendo, pro vidi al la fajroj.

Nun estis tempo al ni. Mi ekprenis la finaĵon de la ŝnurego pro iri unue, sed Winnetou prenis ĝin el mia mano.

„La ĉefo de la apaĉoj estas la unua“, li deklaris. „Mia frato venu malantaŭ li.“

Estis interkonsentita, ke niaj kunuloj sekvu nin en certajn distancojn, tiel, ke ĉiam, post la ŝnurego estis tuŝinta la teron, nur kvar personoj estu je ĝi je la sama tempo. Winnetou komencis. La ŝnurego falis en la profundecon. Mi lasis lin atingi la unuan elstararaĵon kaj tiam sekvis lin. Malantaŭ mi venis Akrokulo. Ni povis malsupreniĝi multe pli rapide ol ni estis pensintaj, ĉar ni preskaŭ ne povis fiksteniĝi. Feliĉe la ŝnurego estis sufiĉe fortika.

Bedaŭrinde ni intertempe disigis ŝtonojn kaj rulaĵojn, kiuj falis malsupren. Unu el tiuj ŝtonoj ŝajne trafis infanon, ĉar ĝi komencis krii. Tuj la kapo de indiano aperis en la de la fajro lumigita fendo. Li aŭdis kaj vidis la malsupren rulantajn ŝtonojn, vidis altecen kaj elvokis laŭtan avertovokon.

„Antaŭen, Winnetou!“ mi vokis. „Alikaze ĉio vanos!“

La viroj supre rimarkis, kio okaziĝis malsupre, kaj lasis la ŝnuregon kuri pli rapide malsupren. Duonan minuton poste ni estis atingintaj la teron, sed je la sama tempo ekfulmis kelkaj pafoj al ni de la fendo. Winnetou falis sur la teron.

Mi staris senmove per teruro.

„Winnetou, mia amiko!“ mi ekkriis, „Ĉu trafis kuglo?“

„Winnetou mortos!“ li spirdiris dum la falo.

Ekregis min kolerego, al kiu mi ne kapablis rezisti. Akrokulo ĵus alvenis flanke de mi.

„Winnetou mortiĝas!“ mi vokis al li. „Ek!“

Mi ne longe donis tempon al mi ŝiri la pafilon de la dorso aŭ ekpreni tranĉilon aŭ revolveron. Per alte levigitaj pugnoj mi ekatakis la kvin indianojn, kiuj jam estis venintaj el la fendo. La plej antaŭa el ili estis la ĉefo. Mi tuj rekonis lin.

„Ko-itse, tereniĝu!“ mi vokis al li.

Pugnobato trafis lian tempion. Li kolapsis. La ruĝulo, kiu staris flanke de li, jam estis reŝvinginta la tomahokon pro bato kontraŭ mi, tiam la brilo de la flamo hele lumigis mian vizaĝon, kaj ektimigite li lasis la milithakilon fali.

„Kâ-ut-skamasti — Smeŝmano!“ li laŭte vokis.

„Jes, jen estas Old Shatterhand! — Morto por vi!“

Mi ne plu rekonis min. La dua batego trafis la viron tiel, ke ankaŭ li falis teren.

„Kâ-ut-skamasti!“ la aliaj *indsmen*:oj time vokis.

„Jes, Old Shatterhand!“ Akrokulo kriis. „Ek!“

Tiam mi ricevis tranĉilpikon en la ŝultron, sed tion mi tute ne sentis. Du el la ruĝuloj falis per la pafoj de Akrokulo, kaj la trian terenbatis mi. Intertempe ĉiam pli da niaj kunuloj venis malsupren. Mi povis lasi la kromajn *indsmen*:ojn al li. Mi turniĝis al Winnetou kaj surgenuiĝis flanke de li.

„Kie mia frato estas trafita?“ mi demandis.

„*Ntságe tše* — tie ĉi en la bruston“, li mallaŭte respondis, metante la maldekstran manon sur la dekstran flankon de la bruston, kiu ruĝiĝis per lia sango.

Rapidpense mi ŝire elzonigis la tranĉilon kaj senhezite deŝiris la *saltillo*-kovrilon, kiu estis suprenŝoviĝinta. Jes, la kuglo estis iĝinta en lian pulmon. Doloro ekregis min, kian mi neniam antaŭe dum mia tuta vivo estis sentinta.

„Ankoraŭ estas espero, mia frato“, mi konsolis.

„Mia amiko metu mian kapon sur lian sinon, ke mi povas vidi al la batalo!“ li petis.

Mi faris tion, kaj nun li povis vidi, ke ĉiuj *indsmen*:oj, tuj kiam ili videbliĝis en la fendo, tuj estis akceptataj laŭ la vico. Niaj kunuloj iom post iom venis malsupren. La kaptitoj estis liberigataj de iliaj katenoj kaj komencis laŭtajn vokojn de ĝojo kaj danko. Pri tio mi ne zorgis. Mi nur vidis la mortantan amikon, kies vundo ĉesis sangi. Mi antaŭsciis, ke li mortsangos interne.

„Ĉu mia frato havas deziron plu?“ mi demandis lin.

Liaj okuloj estis malfermitaj, kaj li ne respondis.

Lia kapo kuŝis en miaj brakoj, kaj mi ne riskis la plej etan movigon.

La maljuna Hillman kaj la aliaj *settler*:oj, kiuj estis liberigitaj de iliaj katenoj, ekprenis la ĉirkaŭe kuŝantajn armilojn kaj envadis la fendon. Ankaŭ pri tio mi ne atentigis, ĉar mia vido nur direktiĝis al la bronkoloraj trajtoj kaj la fermitaj palpebroj de la apaĉo. Pli poste Akrokulo paŝis al mi, kiu ankaŭ sangis, kaj anoncis:

„Ili ĉiuj estas neigitaj!“

„Ĉi tiu ankaŭ estos neigita!“ mi respondis. „Ili ĉiuj estas nenio, kompare al tiu unu!“

Ankoraŭ la apaĉo kuŝis senmove. La decaj *railroader*:oj, kiuj teniĝadis tiel brave, kaj la *settler*:oj kun iliaj anoj formis silente kaj ege kortuŝite cirklon ĉirkaŭ ni. Tiam Winnetou finfine malfermis la okulojn.

„Ĉu mia frato havas deziron plu?“ mi ripetis.

Winnetou kapjesis kaj mallaŭte petis:

„Mia frato Ŝarlih konduku la virojn en la Grand-Ventre-montoj! Ĉe la Metsur-rivero estas tiaj ŝtonoj, kiajn ili serĉas. Ili meritas tion.“

„Kion plu, Winnetou?“

„Mia frato ne forgesu la apaĉon. Li preĝu pro li al la granda, bona Manitou! Ĉu tiuj kaptitoj povos grimpi kun iliaj vunditaj membroj?“

„Jes“, mi diris, kvankam mi vidis, kiel la manoj kaj piedoj de la *settler*:oj estis suferintaj per la tranĉumaj katenoj.

„Winnetou petas al ili, kanti la kanton pri la reĝino de la ĉielo por li!“

Mi transdonis la peton de la apaĉo al la viroj, kaj tuj la maljuna Hillman mansignis al la aliaj. Ili grimpis sur rokan elstarajon, kiu estis super la kapo de Winnetou, pro plenumigi la lastan deziron de la mortanto. Liaj okuloj sekvis ilin kaj tiam fermiĝis, kiam la viroj staris supre. Li ekprenis ambaŭ miajn manojn kaj nun aŭdis la „*Ave Maria*“:n komenci:

*„Nun ekcedas la lum’ de la tago;
nun venas la nokto trankvile.
Ho, se nur l’ anima plago
povus pasi al l’ tago simile!
Mian plendon mi al vi tributas,
ho portu ĝin al l’ trono de Di’,
permesu, ke mi vin salutas,
Madon’, mi pie adoras al vi:
Ave Maria!“*

Kiam nun la dua strofo komencis, liaj okuloj malrapide malfermiĝis, kaj direktiĝis per milda, ridetanta esprimo al la steloj.

Tiam Winnetou tiris miajn manojn sur sian preskaŭ nesenteble spirantan bruston, kaj flustris:

„Ŝarlih, ĉu ne, nun venos la vortoj pri la mortiĝo?“

Mi ne povis paroli. Mi plorante kapjesis, la tria strofo komencis:

*„Nun ekcedas la lum’ de la vivo;
nun venas la nokto de l’ morto.
L’ animo foriĝas per drivo
kiel estas la homa sorto!
Madon’, en vian manon mi metas
mian lastan elkoran revon
ke pri l’ morto en kredo mi pretas,
ke vi igos beatan relevon
Ave Maria!“*

Kiam la lasta sono estis ĉesinta, Winnetou volis paroli — ne plu eblis. Mi igis mian orelon tute proksime al lia buŝo, kaj per la lasta klopodo de lia malaperanta forto li flustris:

„Ŝarlih, mi kredas al la Savanto. Winnetou estas kristano. Adiaŭ!“

Tremo kaj spasma iĝis tra lia korpo, fluo el sango iĝis el lia buŝo. La ĉefo de la apaĉoj refoje premis miajn manojn kaj malstreciĝis siajn membrojn. Tiam liaj fingroj loziĝis de miaj — li mortis — —

Kion mi rakontu plu? La vera funebro ne havas vortojn. Se nur venus baldaŭ la tempo, kiam oni konas tiajn sangoriĉajn rakontaĵojn nur kiel malnovaj fabeloj!

Ni jam estis ofte starintaj vidalvide al la pala morto; la Sovaĝa Okzidento postulas, ke oni pretas por la subita fino ĉiun momenton. Sed tamen, kiam la plej bona, la plej fidela amiko, kiam mi iam havis, nun kuŝis senanime antaŭ mi, mia koro volis disrompiĝi. Mi estis en stato, kiu ne priskribeblas. Kia eminentega homo li estis estinta! Kaj nun tiel subite neigita, neigita! Ĵus tiel post mallonga tempo ankaŭ estos neigita la tuta raso, kies plej nobla filo li estis estinta.

Mi ne dormis la tutan nokton, neparole, kun ardaĵ malsekaj okuloj. Winnetou kuŝis sur miaj kruroj, tiel kiel li ekmortis. Kion mi pensis, kaj kion mi sentis? Kiu volas demandi pri tio! Se estus estinta eble, kiel ŝate, kiel ŝate mi estus partiginta mian pluan tempon de mia vivo, kaj estus teninta por mi nur la duonon! Tiel, kiel li nun kuŝis sur mia sino, iam Klekih-petra ekmortis sur lia, kaj poste ankaŭ lia fratino Nŝo-tŝi.

Lia antaŭsento de la morto do ne estis trompinta lin, kaj per klara divenaĵo li estis difininta la lokon, kie li volis esti enterigata. Ĉar la germanaj ŝtontranĉistoj devis trovi la validajn semijuvelojn tie, ili ŝate pretis rajdi tien kun mi, per kio la transportado de la mortulo estis tree faciligata al mi.

Frue je la sekvinta mateno ni forlasis la Hancock-monton, ĉar ni devis ekspekti la alvenon de la alia aro de la ruĝuloj. La korpo de la morta apaĉo estis volvata en kovrilojn, kaj fiksigata sur lian nigran ĉevalon Iltŝi. De tie ĝis la Gros-Ventre-montoj estis nur du tagrajdadoj. Tien ni survojiĝis, tiel singarde, ke neniu indiano povis ektrovi nian spuron.

Je la vespero de la dua tago ni atingis la valon de la Metsur-rivereto. Tie ni enterigis Winnetou:n, kun kristanaj preĝoj kaj per la honorigoj, kiuj meritas al tiel eminenta ĉefo. Li sidas rekte kun ĉiuj siaj armiloj sur sia Iltŝi, kiu estis mortpafita pro tio, en la interno de teraltaĵo, kiun ni starigis ĉirkaŭ li. Sur tiu altaĵo ne flirtis la skalpoj de mortigitaj malamikoj en la vento, kiel oni kutime vidas tiajn aĵojn sur tombo de ĉefo, sed estis starigitaj sur ĝin tri krucoj.

En la sablo de la valo ne nur troveblis la promesitaj ŝtonoj, sed ankaŭ certa kvanto da orpolvo, per kiu la *railroader*:oj rekompenciĝis pro la perdo de labortempo kaj salajro. Nombro da ili decidis establi vilaĝon kun la *settler*:oj tie, kiu ankaŭ havu la nomon Helldorf. La aliaj reeniris al la Echo-*cañon*, kie ili eksciis, ke la *railtroubler* Monk ekmortis per sia vundo. Liaj kunkaptito estis punataj.

La sonorileto, kiu Winnetou estis enterigita, estis portata al la nova vilaĝo, kie la *settler* denove estis konstruintaj kapelon. Kiam nun ĝia hela voĉo eksonas, kaj la piaj vilaĝanoj kantas ilian „*Ave Maria*“:n, ili ĉiam pensas ankaŭ pri la ĉefo de la apaĉoj, kaj same estas konvinkitaj, ke estis plenumita al li, pri kio li petis preĝe per liaj lipoj:

*Madon', en via mano mi metas
mian lastan elkoran revon
ke pri l' morto per kredo mi pretas,
ke vi igos beatan relevon
Ave Maria!“*